

& Brikaĵoj:

< Rekante 21 el 37 batoj por strofo, entute 185 paŝoj dum 3 minutoj. Verkis Raymond Schwartz (Verdkata testamento, 1929) kun enkonduko: "Ĉiu sumo de mil frankoj estos unu briko. Ni bezonas kelkcent brikojn, ktp..." (*El Esperantaj gazetoj.*). Baladigis Martin Strid (2017) per sama melodio kiel por Konfeso kaj simila rekantaĵo.>

(#Melodio:

<:37> (/dodo dore doTi LaSo; dodo dore mimi mi; mifa soso somi mire; dore doTi LaLa LalSo;

(#Rekantaĵe: do mire do dodo Ti La; LaTi doTi do re mi mi; mifa somi mi re do; do mire do dodo Ti La)

)x5)+

(&Strofoj:

'1 /Ĵus mi legis en gazetoj ; Sub la fama brik-rubrik', ; Ke alvenas la biletoj ; Kun rapido de... heli2k'.

(×:; **Zorgojn mi certe ja havas ; Laŭ mi brikfabriko gravas ; kaj mi propagandas ĝin ; Zorgojn mi certe ja havas.**)

'2 El la fakto, ke pogute ; Nur hezite venas brik', ; Mi konkludas, ke entute ; Ĉe ni mankas brik-fabrik'!

'3 Tial petoj plilaŭtiĝas ; En la brikkolekta fak', ; Kaj minace etendiĝas ; Ĉie nun la brika brak'!...

'4 Kaj mi aŭdas jam amikon, ; Kiu venas kun demand': ; Ĉu vi portis vian brikon ; Al la brika propagand'?"

'5 "Jes", mi ĵuras, "sed ne krii, ; Oni aŭdis nin, amik'! ; Mia briko, – tion sciu – ; Estas... l' anonima brik'!!"